

### **GENERALA KUNVENO DE MADRIDA ESPERANTO-LICEO**

Kiel ni anoncis en nia pasinta bulteno, kaj post la koncerna kunvoko fare de la prezidanto al la anoj, la 29-an de januaro okazis Ĝenerala Kunveno de Madrida Esperanto-Liceo en la sidejo.

Estis aprobitaj la kontoj de la pasinta jaro kaj la raporto de aktivadoj, kun la unuanima kontento pro la kvanto da aktivadoj plenumitaj.



Oni aprobis ankaŭ la planon de aktivado por 2018 kaj la buĝeton. Kiel speciala aktivaĵo oni menciis la organizadon en Madrido de la Hispana Esperanto-Kongreso kaj la Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) fine de julio. En la buĝeto oni aprobis la starigon de stipendioj por la partopreno de du fakuloj en la Simpozio kiu disvolviĝos en la Universitato sine de la ILEI-kongreso. Oni konservis la kotizon de 12 eŭroj por individuaj aliĝoj (se vi ankoraŭ ne estas membro, memoru ke la aliĝilo troviĝas en la fako “dokumentoj” de la retejo de MEL <http://esperanto.es/mel/>, kaj vi povas profiti ankaŭ iun ajn viziton al la klubejo).

Pro fino de la periodo de deĵoro de la estraro, oni elektis novajn estraranojn. En la praktiko, estis reelektitaj la ĝisnunaj estraranoj, kun Manolo Parra kiel prezidanto kaj Ricardo Biurrun kiel sekretario ĉekape, kun la aldono de unu plia voĉdonanto, kiu zorgos pri retaj medioj, William Guerrero. Estis decidita la malfermo de kontoj de la Liceo en la sociaj retoj Twitter kaj Instagram, krom la jam ekzistanta en Facebook; ni informos pri la adresoj kiam ili funkcios.

### **KONGRESOJ EN MADRIDO KAJ ALILOKE**

Plu antaŭeniras la organizado de la kongresoj okazantaj en Madrido en julio 2018: la 77a Hispana Kongreso de Esperanto kaj la 51a kongreso de ILEI, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Konkretaj informoj aperas en <http://www.esperanto.es/kongreso/>.

Jam aperis la unua listo de aliĝintoj al la eventoj (memoru ke eblas aliĝi al nur unu aŭ al ambaŭ); vidu: <http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso/listo-de-aligintoj>. Ĝis nun konfirmiĝis 25 homoj, el 11 landoj kaj 3 kontinentoj.

Ni memorigas ke tuj poste okazos la Universala Kongreso en Lisbono. Ankaŭ antaŭeniras la preparoj por la Internacia Junulara Kongreso kiu disvolviĝos en Badajoz inter la 4-a kaj 11-a de aŭgusto. Vidu la detalojn ĉe <http://ijk2018.tejo.org/>, kaj informu la junajn esperantistojn pri ĝia okazigo, ne nur por partopreno sed ankaŭ por eventuala kunlaboro en la pretigado.

Iom antaŭe, sed ankaŭ proksime, ni deziras informi pro la 11-a Mezorianta Kunveno, kiu okazos 30-a de marto 2018 ĝis la 6-a de aprilo inkluzive de postkunvenaj ekskursoj en Marakeŝo, Maroko. Ankaŭ por madridanoj temas pri bona ŝanco renkontiĝi en internacia etoso kaj samtempe helpi la araban kaj afrikan movadojn. Legu pri la evento en: [http://uea.org/vikio/La dekunua Mezorianta Kunveno en Marakesho, Maroko](http://uea.org/vikio/La_dekunua_Mezorienta_Kunveno_en_Marakesho,_Maroko).

## **MONATA LITERATURA VESPERO**

En la literatura vespero kiu iom post iom firmiĝas, la pasintan 15an de januaro ni omaĝis la eldoniston Juan Régulo, okaze de la 25-a datreveno de lia forpaso la 27an de januaro 1993.

La februara evento okazos la lundon 12-an, en kiu ni profitos la eldonadon pasintjaran de la libro “Memoraĵoj de kampara knabo”, la traduko al Esperanto de unu el la plej popularaj verkoj de la nuntempa galega literaturo, kies aŭtoro estas Xosé Neira Vilas kaj kiun tradukis la viga samideano Suso Moinhos. Ni legos diversajn ĉapitrojn de la libro, kiu nun estas aĉetebla en la libroservo de Hispana Esperanto-Federacio.

## **NOVA KURSO**

En januaro komenciĝis la nova kurso de esperanto en nia sidejo, kun sufiĉe bona akcepto. Proksimume dek homoj lernas sub la gvidado Andy Hernández. La lecionoj daŭras unu horon kaj duonon, de la 16:30 ĝis la 18:00 vespere, ĉiujn lundojn.



## **RADIO UTOPIA**

La venontan 23-an de februaro, je la 7-a vespere, iuj esperantistoj partoprenos en radioprogramo de la stacio Radio Utopía, kiu elsendas el San Sebastián de los Reyes. Oni povas aŭskulti ankaŭ rete ĉe la adreso <http://www.radioutopia.org.es/olvida-tu-equipaje/>.

## **KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ**

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30.

La unuasabataj renkontiĝoj ĉimonate okazos la 3-an de februaro, ekde la 18:00 horo. Ni revenas al la kafejo Madrid, strato Mesón de Paños, 6, proksime al metrohaltejo Opera.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la retliston [http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto\\_madride/](http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/).

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

[madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es)



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al [nivocho@gmail.com](mailto:nivocho@gmail.com)